

RECENZA BABILO

Pasintjare (Fonto 170) aperis recenza babilo sufiĉe longa. Al ĝi kontribuis ankaŭ amiko Ladislav Podmele el Prago. La pozitivaj reagoj instigis min, denove interlaĉi por vi kelkajn recenzetojn. Ĉifoje helpis min Jan Harselaar: temas pri novaj libroj, kiuj min atingis depost januaro 1996, foje donace foje aĉetite.

Gerrit Berveling

Jarfine 1995 venis surprizi min *La beleco de Merab*. La aŭtoro debutis kiel poeto, sed verkis plurfoje romanojn aŭ novelojn. Li estas membro de l' Sveda Akademio. Estas vere originala verko, kiun mi ne scias klare difini. Ĝi impresas kiel redono de simpla vilaĝa rakontanto, kiu ĉe fajro-lumo vespere arigas ĉirkaŭ si la homojn por momento de forvagado en la miraklan mondon de l' rakontado. Temas pri blagoj, ŝercoj, anekdotoj. Malriĉa tajloro, irante de bieno al bieno vendas murtapiŝojn kudritajn el ŝtofo-restaĵoj kun piaj aŭ sagaj tekstoj: "En la komenco estis la Vorto" ktp. Kaj ankaŭ (kaj tio estas centra!) temas pri liaj rakontoj. Kvankam daŭre fonas kristanismo, en citaĵoj, aludoj, duoncitoj kaj parolturnoj el la biblio, la tuto neniel estas bigota. Male, la sobra moralo resumigas iel jene: Ne troigu, ne estu tro certa! (Parenteze: vidu *Predikanto* 7:16).

En unu el la eroj, la grandioze brila "Akvo, temas pri putfosisto kiu plej

obstine volas trovi akvon por terpeco ekstreme seka; obstingege li plu fosas ĉiam nur unuloke, ĝis kvardek-kvin-futa profundeco. Tiam subite:

... ekmuĝis malsupre en la puto, sonis kiel pluvo sur fojneĵ-tegmento: la suda muro de la puto cedis, ĝi ja ne estis stegita, kaj mi tuj kuris malantaŭen kelkajn paŝojn; ankaŭ la tera rando plej supre de la puto moviĝis, ja krome troviĝis neniuj malseko, kiu povus kunglui la gruzon kaj fundmorenon, kaj sekve ĝi falis kaj fluis kiel sablo en sablohorloĝo; impresis kiel pudroneĝo, kiu vintre plennigas piedsignon; la tuta puto malaperis, kvazaŭ ĝi estus fosita en granda akvo kiu refalas, restis nur kvazaŭ valetto de la puto, la kvardekkvinfuta puto.

Kaj mi ja estis sufiĉe senpova.

Mi vokis Teresia, kaj ŝi venis eksteren, kaj ni staris tie kelkan tempon; estis larmoj en ŝiaj okuloj, kaj ŝi demandis: "Ĉu li devis suferi?"

“Okazis terure rapide”, mi diris. “Mi eĉ kredas, ke li ankoraŭ estas staranta. Li restas staranta en profundo de kvardek kvin futoj”.

“Li volis fari sian plejkapablon”, ŝi diris. “Jen la sola, kion li volis. Fari sian plejkapablon.”

“Mi petis lin veni supren”, mi diris. “Se li farus, kiel mi petis, tio ĉi ne okazus”.

“Jes”, ŝi diris. “Obstinkapulo li estis. Sed ili eble estas tiaj. La putfosistoj”.

Poste mi do devis iri al Norsjöö; mi ja ne sciis certe kiel aranĝi.

“Li restas staranta en profundo de kvardek kvin futoj”, mi diris al la pastro. “Mi bezonus la tutan someron por reelfosi lin”.

La pastro pripensis kelkan tempon. Poste li diris:

“Surmare oni benas la mortintojn al eterna ripozo tuj surloke. Kiu perdas la vivon surmare, tiun oni ne kaptas el la profundo por meti en benitan teron. Kaj tiu ĉi putfosisto Lidström, kiu restas staranta en profundo de kvardek kvin futoj, li ja estas kiel maristo droninta en sia maro”.

Sekve mi iris hejmen kaj malfosis tiun kavon, mi remetis la tuton kiun Lidström elfosis, fajnan sablon kaj gruzon, ĝis denove estis plate kaj ebena, kaj mi metis tien kelkajn framboplantojn, kaj Teresia faris kronon el sorpobranĉetoj, kaj kiam pasis du semajnoj, la pastro venis fari enterigon. “Jes, oni nomas tion enterigo”, li diris, kiam mi demandis, ĉu tio efektive estas tute necesa. “Vi estas

polvo kaj refariĝos polvo”. Kaj li eksciis per la pastro de Vindeln, ke tiu ĉi Lindström ne havis familion aŭ iujn parencojn en Strycksele, li estis kvazaŭ ermito, kaj la pastro laŭtlegis el Mateo verson pri akvo: “*Kaj kiu trinkigos nur tason da malvarma akvo al unu el ĉi tiuj malgranduloj, tiu neniel perdos sian rekompencan.*”

Kaj Teresia diris al la pastro:

“Li asertis, ke li fosis pli ol centon”.

Sed ni ja devis resti sen akvo.

Preskaŭ samtempe el Brazilo alvenis en fora Eŭropo *Teri-Strato* de Douglas Dunn. Plaĉe eldonita libreto, kiel ni kutimas de *Fonto*. Kun 3 trafa-etosaj ilustraĵoj. Estas tre bona ideo verki poemciklon pri difinita strato. Veki al la vivo l' impreson, la etoson kiu tie dormetas, dumtage kaj nokte. En la «Fenestra amindumado» ekzemple:

*Ni rigardis la samajn aferojn,
Virojn sur bicikloj, forĵetaĵon ĉirkaŭ
[kloako.
Paserojn manĝantajn en ombro glacia.*

*Ni aŭdis la saman enplekton de bruoj
[hazardaj,
Ĉantadon de ludoj infanaj...*

Du personoj, tute ne tuŝante sin, rigarde amindumas trafenestre, dedistanco. Kaj legante oni preskaŭ fariĝas unu el ili, kunsentante, rigardante. Estas vere tre simple vortigita, tre bela vorta pentr-